

Bulgara ESPERANTISTO

63a Universala Kongreso de Esperanto





Post la ĤE-recitalo (de maldekstre): La gepoetoj Simeon M. Simeonov, Penka Batoeva kaj Asen Grigorov, poste Vera Văjaro, Nadja Zlatina, Kunĉo Vălev (vd. paĝon 4).



Entuziasme instruas E-ton s-ano Taŝko Georgiev en la teknika lernejo „Najden Stojanov“, u. Ĉirpan



ENHAVO

* * *	Al pli alta krea spirito	1
* * *	L. I. Breĵnev en Esperanto	2
* * *	„Heroldo“ kaj „Esperanto“ pri la kongreslando	2
* * *	63-a UK de Esperanto (el „Oficiala Komunikilo“ n-ro 5)	3
	Draguŝko Petrov. 63-a UK kaj la poŝtistoj-esperantistoj	4
	Rajna Konstantinova. Neforgesebla recitalo de E-poezio	4
	B. Kavalĝiev. Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista	5
	Goĉo Koev. Printempa E-balo	5
	Georgi Andreev. Renkontiĝo de tri E-generacioj	6
	Geno Manev. Celebro de Botju Penev	6
	R. Georgieva. E-aktivecoj en Pazarĝik	6
* * *	Lingva laboratorio	6
	Nadja Zlatina. Letero el Bulgario	7
	Stefan Sokolov. Nekonata ribelinto	7
	Cvetana Petrova. Filino de voluntulo rakontas	10
	Ilija Ivanov. Unu muzea eksponaĵo rakontas	11
	Arpád Abonyi — Nagy. Kooperativa kunlaboro pere de la Lingvo Internacia	11
	Vasilij Grigorenko. La E-movado en Sovetunio progresas	12
	Naum Sigal — Podolskij. La blinteco ne estas obstaklo	13
	Dimitro Haĝiev. Grava artikolo de prof. Peevski	14
	Miroslav Malovec. Ankoraŭ unu reĥo	15
	Ivan Krilov. La Muso kaj la Rato	16
	Romano Grinŝpan. Novaj proverboj. Enigmo	16
* * *	Humuraĵoj	16
	Genadij Berezin. Vortenigmo „Kvin litero“	III
* * *	Dezirata korespondi	III

Sur la kovrilpaĝo :

La titolpaĝo de Dua Oficiala Bulteno de la (3-a UK de Esperanto

Redakta komitato :

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis : Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Konstante plimultiĝas la e-istoj en la kongresurbo Varno. *Sur la foto* : La kurso de la pasintjare diplomita E-kursgvidantino Lili Vălĉeva (en la mezo, staranta).

**AL PLI ALTA KREA SPIRITO!**

Kelkajn monatojn nia popolo vivis sub la signo de aktiva preparo por la Nacia Konferenco de la Bulgara Komunista Partio — la partio gvidanto de nia lando. La problemoj, starigitaj antaŭ la konferenco, estis vigle diskutitaj en miloj da laborkolektivoj, trovis vastan speguligon en la tuta gazetaro, en la radio kaj televido, estis tuŝitaj en pli ol 11000 leteroj de inĝenierteknikaj kaj sciencaj kadroj, socipolitikaj kaj kulturaj agantoj kaj tute ordinara laboruloj en urboj kaj vilaĝoj. Manifestigis kun plena forto baza leĝo de nia socialisma socio, leĝo de demokratismo kaj humanismo: en decidado de la plej gravaj problemoj de nia socia disvolviĝo partoprenas la tuta popolo.

Kronigo de la tutpopola aktiveco estis la Nacia Partia Konferenco en aprilo. La raporto de la unua gvidanto de BKP kaj la popola ŝtato k-do Todor Živkov, same ankaŭ la dutagaj eldiroj de homoj el ĉiuj branĉoj de la ekonomiko, scienco kaj socia sfero, tuŝis vivgravajn problemojn de nia socio: raciigon kaj modernigon de la produktaj procesoj, multmaŝinan priservadon kaj laŭbrigadan organizadon de la laboro, pli racian utiligadon de la materialaj kaj laboraj fontoj, kompleksajn programojn por teknika progreso, ekvilibrigon de la laŭplanaj fontoj kaj la bezonoj ktp. La plej valoraj el tiuj eldiroj kristaligis en la akceptitaj de la konferenco „Tezoj pri la perfektigo de la socialisma organizado de l'laboro kaj de la plana gvidado de l'ekonomio“.

Malantaŭ ĉiuj ĉi pure ekonomiaj formuligoj kaj teknikaj indikoj montrigas la granda problemo — perfektigi la konstruanton de la matura socialisma socio — la homon. Ĉar ĉiuj ĉi nocioj, kiujn oni opinias nete produktadaj, ekonomiaj kaj teknikaj, havas siajn profunde moralajn mezurojn, nomatajn konscio, konvinko, kredo, socia idealo, respondeco, devo. Por antaŭeniri estas necese koni ne nur la ekonomiajn kategoriojn kaj teknikajn metodojn, sed ankaŭ kompreni la procesojn en la homa animo, malkovri senĉese la stimulojn, kiuj rompas la tradicion, rigidan kaj burokratan penson, la mekanikan, formalan plenumon de la devoj kaj kuraĝigas la kreaan aŭdacon kaj iniciaton kaj ĉe la gvidanto kaj ĉe la plej ordinara laborulo. Eksterordinare grava konidiĉo de laboro estas la atmosfero de fido kaj estimo al la homo, la alta postulemo al lia laboro kaj la samtempa kamarada subteno kaj helpo al liaj iniciatoj. Unuagradan signifon ricevis la tasko aktivigi la kreaan partoprenon de la laboruloj kaj la laborkolektivoj en la gvidado de la ekonomiko, altigi ilian senton de propra devo, ilian interesigon kaj disciplinon kaj por la preparo de la plano, kaj por ĝia plenkvanta kaj altkvalita plenumo. En sia ra-

porto en la konferenco k-do Jivkov diris: „La socialisma organizado de la laboro estas decida faktoro ne nur por plialtigo de la efektiveco kaj la kvalito de la ekonomiko, sed ankaŭ por **la labora, politika kaj ideologia edukado de la laboruloj en nia lando**. Ĝi ĉiutage, ĉiuhore, ĉiminute efikas sur la konscion de la homoj, formas tiujn aŭ aliajn konceptojn ktp. La pli bona organizo de la laboro kreas kaj devas krei pli bonajn kondiĉojn por laboro, por subteno kaj disvolvo de la laborkapablo de la homoj, por konservo de ila sano, por ilia plenvolara krea manifestiĝo. Ĝi ludas kaj devas ludi ekstreme gravan rolon por perfektigo de la kamaradecaj interrilatoj de la konstruantoj de socialismo, por iompostioma transformiĝo de la laboro en unuan vivneceson, por multflanka disvolviĝo de la personeco.“

Nun la efektiviĝo de la decidoj kaj la Tezoj de la Nacia Partia Konferenco estas la plej grava, unuagrada kaj senpera tasko de la tuta laborista klaso, de la kooperativaj vilaĝanoj, de la sciencetknika kaj kultura intelektularo, de ĉiuj laboruloj en Popola Respubliko Bulgario.

La bulgaraj esperantistoj, karno el la karno kaj sango el la sango de sia popolo, ankaŭ donos valoran kontribuon, manifestante la karakterizajn por ili altan senton de respondeco kaj disciplino, riĉan animecon kaj altan civitaŝan kaj laboran moralon. La krea veruo de la decidoj kaj la Tezoj de la Nacia Partia Konferenco instigos ilin enporti en sian Esperanto-laboron pli da organizateco kaj disciplino, pli da krea spirito kaj iniciatemo — por pli kaj pli granda disvastigo de Esperanto inter la bulgaraj laboruloj, por konstrui kaj utili laboro sur la kampo de la internacia kompreniĝo kaj amikeco, por la paco sur la tero.

Kaj tuje: por brila preparo kaj okazigo de la mondaj Esperanto-forumoj en nia lando — la 63-a UK de Esperanto kaj la 34-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso!

L. I. BREĴNEV EN ESPERANTO

En sia n-ro 10 de marto 1978 j. ĵ. „Moskvaj Novaĵoj“, eldonata en angla, franca, hispana kaj araba lingvoj en Moskvo, aperigis gravan aldonon — la Raporton de Leonid Iliĉ Breĵnev pri la Projekto de Konstitucio de USSR kaj pri la rezultoj de ties tutpopola pridiskuto, faritan je la 4 de oktobro 1977 en la sesio de la Supera Soveto de USSR. La materialo okupas 15 paĝojn.

La aldono estas anoncita kaj enkadrita sur la titolpaĝo, supre, dekstre, per grandaj literoj, esperantlingve.

Sur la lasta paĝo oni donas en E-o kelkajn informojn pri la ĵurnalo. En senpagaj aldonoj ĝi publikigas plenajn tekstojn de ĉiuj plej gravaj oficialaj dokumentoj de la Soveta Stato. Adreso de la Redakcio: USSR, MOSKVO, str. Gorkij 16/2.

La aperigo de la Raporto de L. I. Breĵnev estas notinda fakto por la e-istoj. Ni varme dankas la Redakcion!

„HEROLDO“ KAJ „ESPERANTO“ PRI LA KONGRESLANDO KAJ UK

La duobla 8-paĝa aprila n-ro de „Heroldo de Esperanto“ dediĉis 5 paĝojn al la kongreslando Bulgario kaj la 63-a UK. Centran lokon okupas la materialo „Vojaĝo en la pasinteco de Bulgario“ de Bernard Golden, hungara arkeologo. Aliaj materialoj: „Varna — reĝino de la Nigra Maro“ de Violin Oljanov, pri la urbo de la Junulara Kongreso Veliko Târnovo de S. D., pri la urbo de la antaŭkongreso Vraca, pri la Monaĥejo de Rila de A. Anĉev, la parko-muzeo „Etara“ laŭ M. B., pri la urboj Sofio kaj Plovdiv, pri Elin Pelin — klasikulo de la bulgara literaturo de At. Svilenov, pri bulgaraj ritoj kaj festoj ktp. Sur la unua paĝo de la ĵurnalo — vidaĵo de la Kongresejo — la moderna Palaco de Sporto kaj Kulturo. Abundas aliaj fotoj.

Ankaŭ „Esperanto“ en sia n-ro 4 publikis materialojn pri la kongreslando, pri Varno (Sur p. 3)





Varno (Bulgario) 1978.07.29 — 08.05

El „Oficiala Komuniko“ n-ro 5

Dekparta kongrestemo. La kongresanoj estos invitataj elekti inter dek diskutrondoj, kiuj traktos diversajn aspektojn de la kongresa temo „Internacia lingvo — internacia edukado“. La temoj estos: memlernado; studrondoj; korespondaj kursoj, eksterlernejaj kursoj; varbado al kursoj; novaj parolantoj de E-o; E-o kaj la pensiuloj; internacia edukigo kaj E-o; lernado kaj samtempa klerigo; E-instruaj perspektivoj kaj problemoj en Afriko. La lasta temo, proponita de Internacia Ligo de E-Instruistoj, aktualigas pro la planita konferenco de ILEI en Madagaskaro en 1980.

Abunda ISU-programo. Internacia Somera Universitato ĉi-jare ofertas dek du prelegojn kun prelegantoj el naŭ landoj: Vilmos Benczik (Hungario) — „Teoriaj problemoj de la E-literaturo“; Aurel Boia (Rumanio) — „La baza vortprovizo kaj la vortstatistikaj esploroj en E-o“; Vasil Ĉoĉov (Bulgario) — „Utiligado de la libera tempo: socialaj kaj psikologiaj aspektoj“; László Göttler Kárpáti (Hungario) — „La komputilaj retoj kaj la lingvo-problemo“; Sin'itirō Kawamura (Japanujo) — „La plantaj fibroj kiel komponaĵoj de manĝaĵoj“; Sergej Krajnov (Soveta Unio) — „La hipofeo — altvalora kuraca kaj frukta planto en Eŭrazio“; Margrete Landmark (Norvegujo) — „Pri unu tipo de malfacilaĵo en la lernado de skribado“; Jonathan Pool (Usono) — „Elementa modelo por solvo de la problemo de lingva diverseco“; M. T. Popov (Soveta Unio) — „Signaj nombroj kaj magiaj kvadratoj“; Wim M. A. de Smet (Belgio) — „La balenoj, minacataj gigantoj de la oceanoj“; So Gilsu (Korea Respubliko) — „La utopio de Konfucio“; Saburo Yamazeo (Japanujo) — „Kio estas prostaglandinoj?“.

Aldone al la kutima ISU-prelegaro okazos la Esperantologia Konferenco sub aŭspicio de ISU kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Prelegos ok esperantologoj — el Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germana DR, Hungario, Islando, Japanujo, Nederlando kaj Norvegujo.

Demandu la Estraron! Ĉu io pri la funkciado de UEA estas neklara al vi? Ĉu vi volas scii, kiajn planojn por la estonteco havas la centraj organoj de la Movado? Skribu vian demandon (preslitere kaj koncize!), venigu ĝin al Varno kaj metu ĝin en la korbbon „Demandoj por la Estraro“, kiun vi trovos en la kongresa akceptejo. La Estraro de UEA respondos al laŭeble multaj ricevitaj demandoj dum la Unua Generala Kunsido.

Agadas la virinoj. La kvara sesio de la Komisiono pri Virina Agado estos la plej ampleksa ĝis nun, kun plurtema publika kunveno, ekskurso al bulgara uzino, kie laboras virinoj, lunĉo (por invititoj) kun la prezidantino kaj aliaj anoj de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, prelegoj de Ada Fighiera—Sikorska (Belgio) pri ŝiaj spertoj kaj problemoj kiel redaktorino de *Heroldo de Esperanto* kaj Julie Tonkin (Usono) pri vojaĝemaj virinoj de la pasinta jarcento.

Nova limdato por la Infankongreseto. La limdato por aliĝo al la Internacia Infana Kongreseto estas prokrastita ĝis la 15-a de junio 1978. Aliĝiloj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la konstanta adreso de UK kaj ĉe LKK.

Aliĝis la trimila. Je redaktofino (1978.04.26), registritaj estis precize tri mil kongresanoj laŭ jena distribuo: Bulgario 1123, Pollando 33, Ĉeĥoslovakio 294, Hungario 203, Francujo 159, Finnlando 104, Svedujo 81, Germana DR 74, FR Germanujo 74, Nederlando 68, Belgio 52, Usono 51, Britujo 50, Italujo 48, Japanujo 42, Jugoslavio 33, Svislando 25, Hispanujo 24, Islando 19, Danlando 17, Rumanio 15, Kanado 13, Aŭstralio 11, Norvegujo 11, Portugalujo 11, Aŭstrio 9, Brazilo 8, Israelo 8, Luksemburgo 8, Nov-Zelando 7, Argentino 5, Soveta Unio 3, po 2 el Greklando, Irlando kaj Korea Respubliko kaj po 1 el Burundio, Egiptujo, Irano, Jemena DR, Sud-Afriko, Urugvajo kaj Zairio.

(*cl p. 2*)

kaj Veliko Târnovo. Titoloj: „Ĉiu mila loĝanto esperantisto“ de Simo Milojeviĉ, „Tri virinoj rakontas...“ (pri la iama Bulgario) de Julie Tonkin, „Iama metropolo“ (la urbo de la 34-a TEJO-kongreso). Ĉiuj materialoj riĉe ilustritaj. Sur la kovrilpaĝo: vidaĵo al la fama Monaĥejo de Rila.

Enkadre de la 63-a UK de E-o en Varno la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (IPTEA), kies sidejo estas en Sofio, havos sian dekan jubilean E-konferencon. Tiucele estas difinita ejo kaj horo. Laŭ anticipaj informoj en la laboroj de la konferenco partoprenos pli ol 50 delegitoj kaj gastoj el multaj eŭropaj landoj, el Japanio, Usono, Kanado ka.

Oni diskutos pri la nuna stato kaj la antaŭstarantaj taskoj de la organizo kaj la estraro de IPTEA, de ties sekcioj en Finnlando, Hungario, Francio, Italio, Svedio, GFR kaj Bulgario, de esperantistaj PTT-grupoj en Japanio, Belgio, Nederlando ka.

Estos prezentita sciencpopulara raporto pri la teknikaj atingoj en la sfero de la telefonaj komunikoj en la plej progresintaj tiurilate landoj.

La poŝtistoj-esperantistoj de Bulgario, organizitaj en kelkaj memstaraj E-societoj en Sofio, Plovdiv, Ruse, Veliko Tŕrnovo, Jambol, Karlovo ka., manifestas viglan intereson al UK kaj la Konferenco. Nur el la Sofia Poŝtista E-societo „Heroldo“ aliĝis al la Kongreso kaj partoprenos la Konferencon de IPTEA 15 personoj. Tiaj estos ankaŭ el la societoj de Veliko Tŕrnovo, Plovdiv kaj Ruse.

IPTEA kunlaboras kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj havas in-

terrilatojn kun vico da esperantistaj asocioj kaj samprofesiaj E-organizoj, fonditaj je profesia principo en la kvin kontinentoj de nia planedo.

Por popularigo de nia Asocio kaj ĝiaj atingoj multe kontribuas ankaŭ ĝia esperantlingva presorgano — la bulteno „INTERLIGILO“, eldonata en Bulgario, kaj aliaj materialoj, kiujn oni presigas pri la laboro de apartaj PTT-sekcioj kaj esperantistoj.

Per apartaj cirkuleraĵoj, leteroj, sendataj periode al la poŝtaj administracioj, membroj de la Universala Poŝta Unuiĝo, kaj al la Internacia Unuiĝo de la Telekomunikoj, IPTEA faras priesperantan propagandon en la PTT-medioj, laboras por akcepto de E-o kiel oka laborlingvo fare de la Buroo de la Universala Poŝta Unuiĝo, kies sidejo estas en Berno, Svislando.

Grandparte la sukcesoj kaj la aŭtoritato de IPTEA ŝuldiĝas al la senlaca laboro de la bulgaraj e-istoj en la sfero de PTT. Per Esperanto ili bone plenumas sian internacian devon kaj kontribuas multe por konigi al la fremdlandaj e-istoj nian landon kaj ties grandajn sukcesojn en la socialisma konstruado, por vigligi la internacian kunlaboradon kaj la politikon de serenigo en ĉiuj sferoj de la internacia vivo, por paco kaj reciproka komprenigado inter la popoloj.

Draguŝko Petrov

ORGANIZA VIVO

NEFORGESEBLA RECITALO DE E-POEZIO

La 19-an de aprilo en la salono de la Sofia E-societo „M. Gorkij“ okazis recitalo de originala E-poezio, plenumita de Vera Vaĵarova. Vaĵarova estas eksa operartistino, ludinta la ĉefrolojn en multaj operoj („Madam Baterflaj“, „Toska“, „Boĥemianoj“ ka.). La salono estis neordinare plenplena, ĉar venis e-istoj el ĉiuj ĉefurbaj societoj. Multaj restis starantaj.

Koncizan prelegon pri la E-literaturo, aparte pri la E-poezio, faris Kunĉo Vălev, sekretario de BEA. Li substrekis, ke la E-literaturo, aparte la E-poezio, estas tute nekonata al la neesperantista publiko kaj nesufiĉe konata al granda parto de la e-istoj. Iuj pensas eĉ, ke tia literaturo ne ekzistas kaj ne povas ekzisti, ke E-o taŭgas nur por ordinara interparolo, korespondado, turismo, komerco. Sed la E-literaturo ekzistas kaj havas siajn bonegajn reprezen-

tantojn. Vălev citis la nomojn de la plej elstaraj en la tri periodoj de la E-literaturoj Poste li gvidis la tutan programon, prezentante la poetojn.

Vera Vaĵarova recitis poeziaĵojn de Zamenhof, Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Elvira Lippe, Ljudmila Jevsejeva, Viktor Gonzalez kaj „tri perlojn de Marjorie Boulton, la plej granda E-poetino kaj ĝenerale unu el la plej grandaj poetoj“, kiel diris K. Vălev („Obsedo“, „Peto“, „Senkulpa serenado“).

La unua parto de la recitalo finiĝis per majstra violonludado de Nadja Zlatina, kiu plenumis „Baladon“ de la rumana komponisto C. Porumbesku.

La dua parto de la recitalo estis dediĉita al la bulgara originala E-poezio. K. Vălev substrekis, ke en ĝia ora trezorejo restos por ĉiam la nomo de Asen Grigorov, la





Vera Văjarova

plej elstara bulgara E-poeto, kiu ne nur mem verkas, sed ankaŭ organizas kaj edukas verkemajn e-istojn. Grigorov estas prezidanto de la Literatura Sekcio de BEA kaj

multjara gvidanto de la Sofia Literatura E-Rondo. De li la artistino recifis tri versaĵojn („Gardu la pacon!“, „Al Zamenhoj“ kaj „Espero nia“). La entuziasmigita publiko vokis la aŭtoron, kiu modeste kliniĝis sub tondraj aplaŭdoj. Sekvis recitaĵoj el la verkaro de Ljuba Bojaĝieva, Stojan Kostadinov, Prodan Prodanov, Penka Papazova, Georgi Miĥalkov, Penka Batoeva, Simeon M. Simeonov („tiu bardo de la E-poezio!“) kaj Nevena Nedelĉeva. La ĉeestantaj Batoeva kaj Simeonov ankaŭ estis vokitaj kaj varme aplaŭditaj de la publiko.

En preskaŭ unu horon kaj duonon Vera Văjarova faris brilan recitalon, kiun la ĉeestantoj neniam forgesos. Ŝi majstre plenumis la apartajn verkojn, ofte tre diversaj laŭ enhavo kaj formo. Ŝia recitado distingiĝas per profunda kompreno de la recitata peco kaj per plej subtila esprimo de ĉiu sento, tremo kaj penso de la aŭtoro. Apartajn profundojn ŝi atingas ĉe la intima liriko.

La prezidanto de E-societo „Maksim Gorĵij“ Ivan Keremidĉiev esprimis la grandan dankon de la tuta publiko kaj enmanigis florojn al la partoprenintoj en la recitalo. Multaj ĉeestantoj surŝutis per dankoj kaj floroj la artistinon Văjarova.

Rajna Konstantinova

Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista en Ruse

Sub la nomo Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE-78) en Ruse je la 8—10 de aprilo okazis printempa festo, dediĉita al la 100-a datreveno de la liberigo de Bulgario el otomana jugo. La feston partoprenis ĉ. 150 e-istoj el Nord-orienta Bulgario. La salono kaj la enirejo de la turista domo „Prista“, kie okazis la renkontiĝo, estis bone ornamitaj. Eĉ la aŭtobusoj 6 kaj 16, kiuj veturas al la direkto de „Prista“, estis ornamitaj per verdaj steloj.

La solenaĵon malfermis la prezidanto de E-societo „Libero“ Georgi Dobrev, kiu bonvenigis la gastojn kaj invitis la gvidantojn de la gastantaj grupoj okupi lokon en la prezidantaro. Stefan Popov faris raporton lige kun la 100-jara jubileo de la bulgara libero. Boris Kavalĝiev bonvenigis per versaĵo la gastojn kaj per alia prigloris la 100-jaran jubileon. Sekvis la salutoj de la gastoj, kiuj samtempe rakontis pri sia E-agado.

En la dua parto de la programo estis komuna kaj belarta programo de artistoj el la lokaj teatroj kaj opero. Amuzado kaj dancado daŭris ĝis post noktomezo.

La sekvan tagon la vetero malboniĝis

kaj kelkaj eroj de la antaŭvidita programo ne efektiviĝis.

PARE-78 estas nova impulso por la e-istoj al pli vigla E-agado.

B. Kavalĝiev

Printempa E-balo

La 25-an de marto E-societo „Kolombo de la Paco“ en u. Gălâbovo, distrikto Stara Zagora, organizis printempan E-balon dediĉe al la 100-jara jubileo de la liberigo de Bulgario el otomana jugo kaj la antaŭstarantaj mondaj E-forumoj en nia lando — UK en Varno kaj TEJO-kongreso en V. Târnovo. Gastoj de la balo estis la vicprezidanto de la Urba Konsilantaro de Kulturo Peev, la ĉefredaktoro de ĵ. „Gălâbovska Iskra“ Dinjo Balikov, grupoj da e-istoj el Ĉirpan, Jambol kaj Măglij. La balon malfermis la prezidanto de la loka E-societo Kanju Kanev. Per kelkaj E-kantoj bonvenigis la gastojn Boris Kostov. Salutojn prezentis la gvidantoj de la alilokaj grupoj Taŝko Georgiev, Jivka Paŝova kaj pastro Pavel. Salutis la ĉeestantojn ankaŭ k-do Peev.

Oni starigis diversajn demandojn, al kiuj la e-istoj respondis. Post kelkhoraj ludoj, dancoj kaj amuzado estis elektitaj „mis

Printempo" (Veneta Jančeva) kaj „mister Printempo" (Dimo Tenev).

La sekvan tagon la gastoj vizitis TEC „Iztok-3".

La balo kaj la renkontiĝo de s-anoj el kelkaj loĝlokoj plezurigis ĉiujn.

Gočo Koev

Renkontiĝo de tri E-generacioj

Honore al la 63-a UK nia E-societo „Esperanto Triumfonta" en u. Petriĉ organizis renkontiĝon de e-istoj el tri generacioj. La renkontiĝo okazis la 24-an de marto en salono de popola legejo „Bratja Miladinovi".

Pri E-o en sia vivo rakontis la e-istoj-veteranoj Trajko Dimitrov, Georgi Andreev kaj Stojan Kirjakov, kiuj lernis la lingvon ĉ. 1923 j. Pri sia E-agado kaj partopreno en UK rakontis ankaŭ Pobeda Truškova, Ivan Apostolov kaj Kiril Ĥlebarov, pri sia partopreno en junulara E-brigado — ing. Ĥristo Bančev. Originalajn E-versaĵojn tralegis Apostol Vasilev. Junpioniroj el lernejo „Ĥristo Smirnenski" plenumis esperantlingve kantojn kaj anekdotojn.

La ĉeestantoj estis informitaj pri UK, TEJO-kongreso, la E-tendaro en Druŝevo, pri la Internaciaj E-kursoj en Burgas ka. Aparte estis substrekita la tasko serioze lerni kaj perfektigi sian lingvoposedon, uzi E-ton por praktikaj celoj kaj por la nobla laboro de vastigo de la internacia amikeco kaj kunlaboro, por firmigo de la tutmonda paco.

Georgi Andreev

Celebro de Botju Penev

La 28-an de marto la Komsomolo en la Ekonomia Mezlernejo en u. Drjanovo kune kun la loka E-societo „Ivan Vladkov" organizis celebron de sia patrono Botju Penev lige kun lia naskiĝtago. En la salono de la modela popola legejo en la urbo antaŭ 400 lernantoj kaj instruistoj el la lernejo,

Lingva laboratorio

Bonvolu traduki en Esperanton la jenajn bulgarajn esprimojn, serĉante la plej trafajn ekvivalentojn:

Щеш не щеш, трябва да дойдеш.
И да искаш, и да не искаш — това е то.
Де да беше така!
Прихванали са го.
Тю, да се не види!
Да му се не види и часовникът, и чудото.
Хич се не надявай!
Хич да не е, хич да не е, 100 лева ще отидат.

membroj de la E-societo kaj kunbatalintoj de Botju Penev, rememorojn pri li rakontis lia proksima amiko kaj kunaganto el la gimnaziaj jaroj Neno Janev — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Gabrovo. Interalie li diris:

— Eksterordinare sciama, perfekta lernanto, aktiva e-isto, violonisto kaj amasaganto, Botju estis amato de la lernantaro en Drjanovo kaj poste en Veliko Târnovo. Kun granda amo li laboris en la stenografia, abstinula kaj turista societoj, disvolvis aktivan agadon en la literatura, filozofia kaj E-rondoj. En V. Târnovo li estis prezidanto de E-societo „Flamo", aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio, kristale pura homo kaj komunisto. Tiun agadon li daŭrigis ankaŭ en la kazerno, pro kio la faŝisma potenco kondamnis lin al morto. Botju estis pendumita je la 25 de junio 1942 antaŭ vicigita roto da soldatoj. En la lasta minuto antaŭ la morto li ĵetis kuraĝajn vortojn kontraŭ siaj murdistoj: „... Memoru bone, ke unu persono nenion valoras, post mi venas miloj kaj ili venkos!"

Geno Maner

E-aktivecoj en Pazarĝik

Niaj societanoj fervore kaj obstine laboras por sia perfektigo en la internacia lingvo aparte pro la 63 UK en Varno ĉi-somere. Perfektigan kurson partoprenas 35 societanoj, aliĝintaj al UK. Gvidas la kurson Sotir Vasilev, Pejo Peev kaj Rosica Georgieva.

Je la 14-a de februaro okazis solenaĵo por la e-istoj de E-societo „Radio" — Pazarĝik kaj de ĝia distrikto en restoracio „Trakija" kun belarta programo okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, kun prelego de Petko Arnaudov. Ĉeestis pli ol 50 personoj.

R. Georgieva

Гледай го, на му крой капа.
Ща не ща, дадох и аз нещо.
С по-малко от 50 лева няма да се отървам.

Нейсе, от мене да ми не.

Само това да беше! . . .

Има много да патим от него.

Viajn proponojn sendu al la redakcio de „BE". Spertuloj pri la lingvo pridiskutos ilin kaj ni aperigos la plej trafajn tradukojn.



Nadja Zlatina

LETERO EL BULGARIO

*Dediĉita al la 63-a UK de
Esperanto en Varno, 1978*

Ho, amikino fora kaj amata,
atendas vin malpacience mi,
nom' via estas ofte ripetata,
sed nekonata — fizionomi'.

Vi estas el Afriko, mi — el Bulgario.
Vi estas nigra, mi — kun haŭta hel'.
Naskiĝis en diversaj ni patrioj,
sed paŝas kune al komuna cel'.

Ni ambaŭ havas samajn idealojn.
Laboras same. Harmonias ni.
Per Esperanto en la pens' egalaj,
ni sentas nin fratine pli kaj pli.

Mi volas verŝi al animo via
la amon al la nigramara vast'.
Ja kombiniĝas en surfaco ĝia
kaj furioz', kaj harmonia pac'.

Tempesta, sed belega estas maro nia,
kaprica, kiel bela tentulin'.
Ĉiela nia estas poezia,
patrujo nia ravis vin sen fin'.

La histori' plektiĝas kun legendoj
venantaj de centjaro al centjar'.
Sennombas la bravuloj dum jarcentoj,
vokiĝas de la tento de la mar'.

Venadis komercistoj per ŝiparoj,
galeroj venis pretaj por invad'.
Piratoj krozis tra la bluondaro,
pasigis tutan vivon en rabad'.

Kaj al la mondo de silent' ĉiama,
al la profund' abisma de la mar'
falegis revoj, streboj, amo flama,
celadoj al feliĉo de l'homar'.

*II premio
en la Literatura Konkurso*

Stefan Sokolov

NEKONATA RIBELINTO

Steloj brilis sur la firmamento,
kiam granda figuro ekstaris antaŭ
la pordo de la monaĥejo. Longe li
frapis sur ĝi, sed nur la bojado de
hundoj estis la respondo. Finfine li
malespere ekkriis:

— Se vi estas diaj homoj, malfermu al mi!...

Pereis ribelantoj kaj piratoj,
sanktuloj, komercistoj, nobelar',
ranguloj, korteganoj kaj soldatoj
kaj sklavo duonnudaj el ŝipar'.

Ĉe l'bord' la ĉiopova historio
flugilojn svingis dum la temppasad'.
Eksplodis luktoj por teritorio,
de nova dom' leviĝis la fasad'.

Vi vidos Varnon kun hoteloj altaj,
kun stratoj plenaj de junula rid'.
Konkuros via kor' kun la skafaldoj,
impetos same alten la spirit'.

Kaj Bulgario nova vian koron
varmigis en gastama sia man',
blovetos bonhumoron kaj favoron
per laodoro roza de l'Balkan'.

Al mi vi donos vian mildan manon,
kaj ĝoje, kara, vin rigardos mi.
Ni vage ĝuos maran panoramon
kaj unu lingvon parolados ni.

Rigardos ni la vaston prilumitan
de l'suno frumatena, karulin'.
La maro bruos per sekretoj mitaj,
kaj same arde vi ekamos ĝin.

Ho, amikino mia malproksima,
mi kisas vin fratine, kun kares',
brakumas vin kun ama sent' senlima
kaj vin atendas mi por la kongres'.

El la bulgara: Asen Grigorov

Aperis la prioro mem. Al la peto de
la nekonato pri rifuĝejo la blankhara
maljunulo lamente rediris:

— Filo mia, mi petegas vin! Malaperu pli rapide! La tuta lando brulas! Fluas riveroj da sango. Antaŭ hieraŭ turkoj venis al ni. Ĉu vi dezirus, ke ili nenigu ankaŭ tiun ĉi mo-

naĥejon?

— Ne, patro mia. Mi ne restos ĉi tie. Sed mi estas malsata. . . malsatega. Apenaŭ mi staras sur la kruroj.

La prioro per rigardo mezuris la nekonaton de la kapo ĝis la piedoj kaj nesuperebla kompatio kaptis lin. Vere, tiu ĉi grandulo bezonas multe, multe da pano.

— Iru, — li diris al la apude staranta malgrandulo, kiu tenis flaman-tan kenon per sia longega mano, — kaj prenu unu sakon. Plenigu ĝin per pano. De la freŝbakita prenu. Nur rapide!

La degenerulo ekiris por plenumi la ordonon de sia mastro, sed tiu ĉi aldonis:

— Kaj pecegon da fromaĝo almetu! Sed vi, filo mia, — turniĝis la monaĥo al la nekonato, — dume vi povas gustumi nian dolĉan akveton. Akvo en nia monto ne estas abundaĵo.

Malgraŭ ke la juna viro ne estis soifa, li proksimiĝis al la fontano kaj trinkis el la malvarmega bruanta akvostrio. La servisto alportis la sakon, kaj la nekonato varmege dankis. La animo de la prioro tute moliĝis.

— Restu ĉe ni almenaŭ tiun ĉi nokton, bravulo. Eĉ se venus la sultano mem kun sia tuta soldataro.

— Ne, patro mia. Mi jam kutimiĝis dormi sur nuda tero kaj sen tegmento. Rigardu! — La senhejmulo levigis la manon kaj ridetis. — La steloj brilos super mi kiel lucernoj.

— Ili brilos, sed ne varmigos vin!

Metante manon sur la ŝultron de sia servisto, la maljuna monaĥo diris:

— Iru kaj alportu dikan kovrilon!

Sen diri ion ajn, la nano ekkuris por plenumi ankaŭ tiun ĉi ordonon de sia mastro, sed tiufoje liaj okuloj ekbrilis minace.

Restinte denove sola kun sia gasto, la monaĥo demandis, kiu vento alportis lin sola ĝuste ĉi tien.

Per voĉo sufokita de angoro la nekonato respondis, ke post la frakaso de la ribelo¹, la flugilhava ĉevaltaĉmento de Georgi Benkovski, al

kiu li apartenis, frunte kun la vojevodo, direktis sin al Stara Planina².

— Sed mi postrestis kaj eraris la vojon en la mallumo.

Ĉe la adiaŭo la nekonata ribelulo klinis la kapon kaj prenis la manon de la maljunulo por ĝin kisi.

Tiu ĉi krucsignis super li:

— Dio gardu vin, bravulo! Sankta estas via afero. Pro ĝi antaŭ tri jaroj oni pendigis Levski en nia urbo.

— Ĉu Sofio estas proksime al vi?

— Se vi suprenirus al Poluvrak, la plej alta pinto de nia Lozen-monto, vi vidos en la ebenaĵo aron da lumetoj. Tie estas Sofio.

Kiam la fuĝinto malaperis, la pordo de la monaĥejo fermiĝis, la steloj sur la firmamento daŭris brili, la griloj en la herbaro — kanti, la fontano — brui. Kvazaŭ nenio okazis. Sed post nelonge, simile al kato, iu senbrue transsaltis la altan ŝtonan ĉirkaŭbarilon de la monaĥejo. La ombro dronis en la malluma arbaro. De ie malbonsigne aŭdiĝis gufo. . . Malsupren, malsupren. . . Nek laŭ vojo, nek laŭ vojeto, sed rekte malsupren, tra la deklivo de la monto, por ne perdi valoran tempon. Sed la mallongaj kruroj malhelpis lin. Ho! Se li ne sukcesos, por ĉiam li restos servisto en tiu ĉi damnita monaĥejo. La antaŭan tagon Mustafa Bej mem kun sia eskorto renkontis lin sur la monaĥeja vojo. Kolere li demandis: „He, nano gjaur³! Konstante vi ĉirkaŭiras la monton. Ĉu vi vidis ie sin kaŝantan komiton?“⁴ La monaĥeja servisto respondis, ke neniun suspektindan personon li vidis. „Se vi vidos tian homon kaj komunikos al mi, mi donos al vi plenan monujon da ormoneroj“, — diris jam milde la turko. Nun dio mem ĵetas tiun ĉi vagabondon en la kaptilon, kaj la nano plenrajte postulos la promesitan rekompencan.

¹ La Aprila Ribelo de 1876, kruele frakasita de la turkoj.

² Stara Planina — Balkano.

³ „Gjaur“ — tiel la turkoj nomis la nekristanojn.

⁴ Komito — batalinto por libero, ribelulo.



— — — — —
Sen suspekti ion ajn, la ribelulo atingis la supron Poluvrak, kiu troviĝas ne tre malproksime de la monaĥejo. Elĉerpinte ĉiujn fortojn li haltis ĉi tie kaj ĉirkaŭrigardis. En la mallumo nenion li povis klare distingi krom siluetoj de ĉirkaŭaj montoj. En la ebenaĵo brilis lumetoj de nekonata urbo. Per tremanta mano la juna homo malligis la nodon de la sako kaj frande komencis ŝiri per dentoj la freŝan panon kaj la grasan fromaĝon, benante ne nur la monaĥon, sed ankaŭ lian serviston. Satiginte sian malsaton, li ĉirkaŭvolvis sin en la kamlota kovrilo, kuŝiĝis ĉe arbusto, kaj la dormo tuj kaptis lin.

Vekis lin la unuaj sunradioj de la mateno. Li ekmovis la rigidigitajn membrojn kaj malrapide ekstaris. Ho, suno! Klara maja ĉielo! Post tiom da pluvegaj tagoj... Se li povus resti sur tiu ĉi malkovrita loko tutan tagon por sin varmigi kaj sekigi siajn malsekajn vestojn!

Maltrankvile kaj streĉe li rigardis la nekonatan ĉirkaŭaĵon. Poluvrak tute ne estas alta montosupro, sed de ĝi oni vidas mirinde belan kronon el proksimaj kaj malproksimaj montoj. Iuj ankoraŭ havis neĝon sur siaj krestoj. Fine liaj okuloj fiksiĝis al la verda ebenaĵo, kie simile al blanka mirago situis urbo kun minaretoj. Ĝi elvokis teruran bildon en la imago de la rifuĝinto: pendumilo, kaj sur ĝi kroĉita la nekaptebla Levski — timigilo por la turkoj. Vivanta li estis ĉie kaj nenie. Li disĵetis tra la tuta sklavigita lando la semojn de la ribelo. El tiuj semoj elkreskis miloj da abundaj spikoj, kaj unu el ili, ankoraŭ ne falĉita, estis li, nekonata kaj soleca ribelulo, staranta sur la preskaŭ nuda Poluvrak.

Profunda kaj angora vespiro aŭdiĝis el lia brusto. Kaj en la sama momento okazis io tute terura: el la verda foliaro de la arbustoj, kreskantaj iom malsupre, ektondris fusilo. La rifuĝinto eĉ ne povis turni sin kaj falis.

Kiel bestoj el sia embusko elsaltis deko da viroj kun turbanoj. Ili alkuris al sia viktimo, ĉirkaŭis ĝin kaj longe rigardis. Unua Mustafa Bej, ilia estro, interrompis la silenton. Li diris al la plej juna turko:

— Vi portos la kapon de la komito al la monaĥejo, Jusuf. Montru ĝin al tiu blankbarbulo. Li donis panon al la malamiko de la padiŝako kaj meritas, ke oni bruligu la monaĥejon kaj pendumu lin mem. Sed mi estas grandanima kaj kontentiĝos per el-aĉeto. Unuatempe vi prenu kaj portu al mi la plej belan pavon el lia korto... Poste mi mem vidos kion fari.

— — — — —
De tiuj eventoj pasis jam pli ol cent jaroj. Se iu por unua fojo vizitus tiujn ĉi lokojn, li vidus la saman monaĥejon. Mirigos lin la ŝildo kun la nomoj de montaj vojetoj: Georgi Benkovski, Zahari Stojanov, Pop Grujo... „Pro kio? — li demandus. — Neniu el tiuj ĉi revoluciuloj venis ĉi tien. Ankaŭ la centro de la Aprila Ribelo estas malproksime.“ Ĉiuj vojetoj kondukas al Poluvrak. Oni ĝin nomas pli ofte „Junak“ (bravulo). De ĝi oni vidas la saman ĉarman panoramon, kiun iam rigardis la nekonata ribelinto. Sed kia ŝanĝo! En la ebenaĵo anstataŭ urbo kun minaretoj kuŝas urbego, en kies centro brilas la orkupolo de la templo-monumento „Aleksandro Nevski“, konstruita honore al la rusoj-liberigintoj. Sur la potenca kresto de la najbara monto Vitoŝa blankas ripozdomoj. Sude, ĉe la deklivo de la majesta Rila monto, brilas la barajlago „Iskâr“.

Kelke da paŝoj malsupre troviĝas modesta ŝtona monumento de nekonata bravulo. Ĉi tie zorgemaj manoj plantis betuletojn kaj pinetojn, kiuj de jaro al jaro kreskas. En unu rando de la malgranda parko staras karioleto⁵ kun kanono el ĉeriztrunko sur ĝi. Sur la monumento oni legas jenan surskribon:

⁵ Karioleto — durada simpla ĉareto.

„Al la nekonata ribelinto el la flugilhava taĉmento de Benkovski, mortigita sur tiu ĉi loko pro la libero de Bulgario en 1876.“
Kaj sur la malantaŭa flanko de la

monumento oni legas:

„Anstataŭ lucernoj brilas steloj super la nekonate falintaj bulgaraj titanoj.“

FILINO DE VOLONTULO RAKONTAS

Malmultaj scias, ke nia samideanino Cvetana Petrova, membro de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ kaj ĝia multjara estrarano, estas filino de partopreninto en la Aprila Ribelo (1876) kaj en la Rusa-Turka Liberiga Milito (1877—78). Malfrue eksciis pri tio ankaŭ nia redakcio. Al nia peto rakonti ion pri sia heroa patro s-anino Petrova respondis kun sia karakteriza afableco kaj modesteco.

— Mia patro Petro Popstefanov naskiĝis



en 1854 en la batalema urbeto Klisura, situanta en la piedoj de la fiera Balkano. Tial en nia familio abundis rememoroj kaj rakontoj pri la Aprila Ribelo, kiun Klisura, kiel sciante, tre aktive partoprenis, kaj pri la Rusa-Turka Milito, kiu alportis la liberigon de nia popolo el la nigra 500-jara jugo. Kun tiuj rememoroj kaj rakontoj mi kreskis jam de infanaĝo.

Mia avo Stojĉo Popivanov (la patro de mia patro) komence estis popola instruisto, unu el la fondintoj de la ĉepreĝeja lernejo en Klisura. Poste li finis eklezian lernejon en insulo Halki [apud Istambulo kaj fari-

ĝis popo (pastro) sub la eklezia nomo Stefan. Li aktive partoprenis la Aprilan Ribelon kaj transformis la preĝejon en fandejon de kugloj. Post la frakaso de la ribelo li kaj lia frato Petro (onklo de mia patro) estis forveturigitaj en katenoj al Plovdiv kaj ĵetitaj en la malliberejon Karaulhan. Tie popo Stefan havis la malfeliĉon vidi per la propraj okuloj la pendumon de sia amata frato Petro. Post la armistiko popo Stefan estis liberigita dank' al la defendo de la eksterlandaj diplomatoj en nia lando. Sed pro la turmentoj lia sano estis jam detruita kaj li baldaŭ mortis.

Dum la ribelo mia patro Petro Popstefanov (filo de popo Stefan) estis 22-jara. Li ankaŭ partoprenis la batalon kaj post la frakaso de la ribelo sukcesis eskapi, transiri la Balkanon kaj atingi Danubon. Je la 8 de julio li transbordiĝis ĉe Galac (Rumanio). Tutan jaron li vivis la pezan, sed liberan vivon de la bulgaraj elmigrintoj en la najbara lando kaj en majo 1877, kiam formiĝis la bulgara volontula armeo, aliĝis al ĝi. Oni enskribis lin en la 4-a roto de 4-a bataliono sub la komando de la rusa majoro P. Redkin. Mia patro partoprenis ĉiujn batalojn ekde Danubo ĝis Sipka. Ne restis skribitaj rememoroj de li, sed jen kion skribas majoro Redkin pri la partopreno de la bulgaraj volontuloj en la plej decidaj bataloj ĉe Sipka (tiuj rememoroj estas konservitaj en la arkivo de la Nacia Parko-Muzeo Sipka—Buzluĝa):

„La ardigo de la bulgaraj volontuloj atingis sian kulminon: al ili ne sufiĉis batali per kugloj — ili deziris ĵeti ĉion en la vizagon de la malamiko. Kaj vere, kiam la kularrigiloj de la fusiloj „Saspo“ rifuzis funkcii, al la malamiko flugis ŝtonoj kaj kadavroj. La montopinto transformiĝis en densan fajran mason. En la ravinoj fajfis kugloj, tondris kanonoj. Sterniĝis nuboj da fumo. Kaj super ĉio pendis la ardega suno, klare lumiganta la bildon de la kruelega batalo. Soifo turmentis la homojn, ili tenis la plumbon de la kugloj en la buŝoj, sed tio ne malgrandigis ĝin. Havigi akvon estis ekstreme malfacile — la vojo al la fonto estis enfilata de la turkoj. La akvo kostis multege — la batalantoj pagis ĝin per vundoj aŭ per sia vivo.“

Jen kion notis majoro Redkin pri la batalkvalitoj de la volontuloj:



„La nelertaj komence volontuloj transformiĝis en verajn batalantojn, kies impeton oni devis reteni. La vundoj kaj la morto ligis firme la rusojn kaj la bulgarojn per frataj sentoj kaj reciproka estimo. Tiuj parencaj sentoj de la slavo estu eterne puraj kaj senprofitaj, kiaj ili estis dum la bataloj apud Stara Zagora, Sipka kaj Sejnov.“

Pro la manifestita heroeco mia patro estis promociita kiel serĝento. Li ricevis kvin ordenojn por braveco, inter kiuj ankaŭ la plej altan — „Kruco Sankta Georgo“. Eksciinte pri lia braveco la granda princo Nikolaj Nikolajevič — la ĉefkomandanto de la rusa liberiga armeo, persone enmanigis al li arĝentan pokalon kun lia monogramo. La ordenoj, la medaloj kaj la arĝenta pokalo estas konservitaj en la historia muzeo de Klisura.

La batalvojo de mia patro finiĝis ĉe Sipka: tie li estis grave vundita per kvar kugloj en la brusto. Oni sendis lin al kuracado en Rusujo. En la frata lando li restis tri jarojn. Post la resaniĝo oni aligis lin studi en militlernejo. Bulgario li revenis en 1881. Sed unu el la kugloj — memoraĵo de Sipka — daŭre turmentis lin kaj post longa suferado li mortis en 1906.

Hodiaŭ ni, ĝuante la liberon, kun respekto kaj danko klinas la kapojn antaŭ Sipka — tiu nacia sanktaĵo de la bulgara popolo. La sango de la pereintaj en la Liberiga Milito 200 000 filoj de la rusa popolo por ĉiam ligis la du fratajn popolojn — la bulgaran kaj la rusan. Estu eterna kaj nerompebla la amikeco inter ili!

Filino de la volontulo Cvetana Petrova

UNU MUZEA EKSPONAĴO RAKONTAS

Konate estas, ke por la liberigo de Bulgario el la otomana jugo kune kun la rusaj soldatoj kaj oficiroj batalis ankaŭ armeanoj de aliaj popoloj, kiuj vivis en cara Rusujo. La bulgara popolo sankte estimas la memoron de ĉiuj, kiuj lasis siajn ostojn sur la batalkampoj por nia liberigo. Mi volas rakonti interesan okazon tiurilate.

La instruistino Sofia Rakiene el u. Kretinga, Litova Soveta Respubliko, mia E-korespondantino, estis antaŭ kelka tempo en nia lando. Gastante al siaj amikoj e-istoj ŝi vizitis multajn historiajn lokojn kaj monumentojn, arkitekturajn vidindaĵojn, konatiĝis kun la sukcesoj de la socialisma konstruado en nia lando, renkontiĝis kun pluraj laborhomoj. Ŝi montris grandan intereson al la monumentoj kaj muzeoj de la rusaj liberigintoj.

En u. Pleven Rakiene vizitis la muzeon „La liberigo de Pleven 1877“ kaj tie ŝi rimarkis, ke inter la eksponitaj personaĵoj posedatoj de batalintoj troviĝas ankaŭ litova preĝlibro, eldonita en Vilnius en 1866 j. La libro estas en litova lingvo, sed presita per kirilaj literoj, ĉar tiutempe la rusa carismo malpermesis eldonadon de libroj kun latinaj literoj. La preĝaro estas titolita: „Malnova ora altaro aŭ kolekto de variaj preĝoj kaj psalmoj“.

Post kelke da tagoj, vizitante la templon de Sipka, la instruistino Rakiene kun intereso tralegis la orajn surskribojn en la preĝejo, kiuj atestas, ke inter la heroaj defendantoj de la intermonto de Sipka batalis ankaŭ litova regimento.

Reveninte hejmen Rakiene, tiu ĉi diligenta esplorantino, faris plurajn prelegojn pri socialisma Bulgario. Tiam prelegon, akompanatan de fotoj kaj diapozitivaj, ŝi faris ankaŭ en urbo Siauliai (Sjauljaj). Kaj, kompreneble, ŝi rakontis ankaŭ pri siaj eltrovaĵoj en Pleven kaj Sipka. Eksciinte tiun ĉi fakton, la muzeisto Vincentas Vaitekunas montris profesian intereson al la litova libro, eksponita en la muzeo de Pleven. Mia korespondantino tuj proponis sian helpon. En letero al mi ŝi direktis la peton de tiu ĉi scienclaboristo pri fotigo de la libro. Miaflanke mi turnis min al la Direkcio de la Milit-Historiaj Muzeoj en Pleven, kiu tuj akceptis la peton kaj baldaŭ sendis la fotojn de la titolpaĝo de tiu ĉi litova preĝlibro.

Tiel, dank' al Esperanto kaj la internacia amikeco, la muzeo „Aušra“ en Siauliai akiris fotojn de valora eksponaĵo, kiu atestas pri partopreno de litovoj en la liberigo de Bulgario el sub otomana jugo.

Ilija Ivanov

KOOPERATIVA KUNLABORO PERE DE LA LINGVO INTERNACIA

Bulgara iniciato — hungara reciproko

La evento de ĉi tiu raporto maturiĝis proksimume dum unu jaro kaj estas rezulto de celkonscia laboro de du entuziasmaj e-istoj: la bulgara Anton Antonov kaj la hungara Sándor Kovács.

Anton Antonov, laboranto ĉe la kooperativo de Kubrat, vizitis la hungaran urbon Vârpalota kaj kiel kooperativa fakulo petis sian amikon Sándor Kovács ligi lin kun la gvidantoj de la loka Laborista Kooperativo „Thury György“, ĉar lin tre interesis ĝia laboro.

Nuntempe en Hungario nur en kvar industriaj urboj — inter ili ankaŭ en Várpalota — funkcias laborista kooperativo. Ties celoj kaj rolo similas al tiuj de la terkulturaj kooperativoj, kiuj laŭ la principoj kaj leĝoj de nia socialisma ŝtato servas al la konsumintereso de la kooperativa anaro, samtempe akcelante ankaŭ la vendadon de produktaĵoj al tiuj, kiuj posedas ĉedomajn bienetojn. Ĉar en la provincaj industriaj centroj multe da laboristoj havas ĝardenetojn, kie per hobia hortikulturado ili produktas ion super la bezonoj de siaj familioj, sub kontrolo de la landa kooperativa organizaĵo Szövosz formigis kelkaj laboristaj kooperativoj. Tiuj por la anaro, respektive ankaŭ por la loĝantaro, disponigas iujn varojn.

La gvidantoj de la Laborista Kooperativo en Várpalota kompleze plenumis la proponon de la bulgara gasto. Ili prezentis al li la magazenojn kaj la aliajn diversajn vendejojn, informis lin pri la planoj de la kooperativo.

Hejmenirinte Anton Antonov raportis pri siaj spertoj al la gvidantaro de la loka kooperativo kaj tiam prezentigis la planon: la bulgara kaj la hungara kooperativoj interkonsentu pri kunlaborado. La proponon ĝoje adoptis ankaŭ la Hungara Laborista Kooperativo en Várpalota.

Interkonsento en Esperanto

Post tiuj antaŭaĵoj okazis la unua renkontiĝo de la bulgaraj kaj hungaraj kooperativaj gvidantoj dum la Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE-78) en urbo Kubrat. Dum la preparoladoj ili preparis la esperantlingvan projekton de la interkonsento, kiu havas tri artikolojn.

La unua artikolo devigas la gvidantojn kaj laborantojn de ambaŭ kooperativoj tuj eklerni la internacian lingvon Esperanto, ĉar ĝi estos la oficiala lingvo de la plua kunlaboro.

La dua artikolo fiksas la terenojn de la kunlaboro. El inter tiuj la unua: en urbo Kubrat „Hungaraj“, kaj en urbo Várpalota „Bulgaraj Tagoj“ estos organizitaj jam ekde 1978. La du kooperativoj interkonsentis

ankaŭ pri reciproka interŝanĝado de komercaj kaj gastejaj fakuloj; ĉe, depende de aprobo de la ambaŭlandaj gvidorganizaĵoj, la interkonsento lasas eblecon al evoluigo de plej diverssfera kunlaborado, inkluzive ankaŭ la interŝanĝojn de diversaj varoj.

La tria artikolo parolas pri la kulturilatoj, pri la pli bona ekkono unu de la alia kaj pri reciproka somerumado. La efektivigo de tiu lasta komenciĝos jam en julio ĉi-jare. Tiam bulgara kooperativa delegitaro de Kubrat vizitos la urbon Várpalota, kie okazos solena ambaŭlanka subskribo de la menciita interkonsento enkadre de „La Bulgaraj Tagoj“.

Ĉi tiu raporto tute ne estus komplete, se ni nenion dirus pri la afabla, amika etoso, kiu karakterizis la preparoladojn inter la gvidantoj de ambaŭ kooperativoj kaj dum la oficialaj kunvenoj kaj ĉe la „blanka tablo“. La traktadoj okazis helpe de interpretistoj. La preciza interpretado redonanta bone la plej malgrandajn detalojn, firmigis ambaŭ gvidantarojn en iliaj opinioj: la lingvo de la kunlaboro povas esti nur Esperanto!

La delegitaro de la Laborista Kooperativo el Várpalota estis akceptita ankaŭ de la gvidantoj de „Narkoop“-Centro en la Distrikta urbo Razgrad. Ankaŭ tie oni ĝoje salutis la interkonsenton. La hungarajn kooperativajn fakulojn akceptis ankaŭ la Sindikata Kulturdomo de Kubrat. Invitis ilin ankaŭ la gvidantaro de la kooperativo en u. Isperih. Post vizito en la vendejoj la varpalotanoj kun granda rekono parolis pri la laboro de la bulgaraj kooperativoj, kiujn ili ekkonis en Kubrat kaj Isperih. Supozeble la sekva subskribanto de la nepre ampleksinda interkonsento estos ĝuste la isperika kooperativo.

*Árpád Abonyi — Nagy
El «Világ és Nyelv» — kun
mallongigoj*

Noto de la Redakcio. Jen imitinda ekzemplo de peresperanta agado. Nian varman gratulon al la iniciatinto k-do Antonov kaj al la reciprokinto k-do Sándor Kovács! Ni tutkore deziras plenan sukceson de la iniciato!

LA E-MOVADO EN SOVETUNIO PROGRESAS



De jaro al jaro vastiĝas kaj firmiĝas la internaciaj ligoj inter la popoloj. Ankaŭ kreskas la rolo de la internacia lingvo E-o, kiu ĉiam pli disvastiĝas en la tuta mondo kaj en nia lando. Plej grave estas, ke ĝi ĉiam pli disvastiĝas meze de la junularo. En la Sovetlanda E-movado estas tre multe da junuloj, tial en ĝi de jaro al jaro la E-movado progresas. Ekzemple en 1976 en la 10-a Konferenco de Sovetia



Mi atendas viajn leterojn laŭ adreso
SU-314028, Poltava-28, Krasna 95, loĝ. 16
Vasilij Grigorenko

Esperantista Junulara Movado (SEJM) partoprenis 90 junaj e-istoj, sed en 1977 en la 11-a SEJM-Konferenco partoprenis jam 120 tunaj E-aktivuloj. Se en 1976 por la E-junularo oni organizis unu tendaron — la 18-an Sovetan Esperantistan Junularan Tendaron (SEJT-18), en kiu partoprenis 238 gejunuloj, en 1977 j. jam estis organizitaj du junularaj tendaroj — la Okcident-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-19) en urbo Poltava kaj la Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OrSEJT-19) en urbo Miass, regiono Ĉeljabinsk, kiuj estis dediĉitaj al la 60-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. En OkSEJT-19 partoprenis 200 kaj en OrSEJT-19 partoprenis 126 ge-istoj.

En la vicoj de la plej aktivaj en Sovetunio estas la poltavaj e-istoj, kvankam apenaŭ en la jaro 1975 ni fondis urban E-klubon, kiu nun estas ne nur urba, sed regiona, t. e. Poltava Regiona E-Klubo (PREK). La estraro de la Poltava Kulturpalaco de Sindikatoj, kie lokiĝas nia E-klubo, kreis ĉiujn necesajn kondiĉojn por enhavoriĉa funkciado de PREK, plene subtenas ĉe per mono niajn entreprenojn. Ekzemple per ĝia helpo kaj per vigla subteno de la urba kaj regiona komitatoj de la Komunista Partio ni organizis en majo 1976 E-renkontigon, kiun partoprenis 50 E-aktivuloj el 13 urboj de la Suda Regiono. Enkadre de

tiu E-renkontigo ankaŭ okazis la Unua Konferenco de la Ukraina Societo de E-Aktivuloj (USEA). Sed en aŭgusto 1977 ni jam organizis 10-tagan OkSEJT-19 kaj 5-tagan 11-an SEJM-konferencon. En la kuranta jaro ni organizos en julio E-renkontigon de la E-aktivuloj el Poltava regiono, al kiu ni invitis E-aktivulojn el tuta Sovetunio.

Sed la e-istoj ĉiutage laboras por la internacia amikeco, alivorte la E-kluboj havas la samajn taskojn, kiujn la Kluboj de Internacia Amikeco (KID, esperantlingve KIA). La diferenco estas nur rilate la laborlingvon: en ordinara KIA ĝi estas nacia, precipe la rusa, dum en la E-kluboj — nur Esperanto. Tial la E-kluboj plene nomigas E-kluboj de Internacia Amikeco (EKID, esperantlingve EKIA). Ekzemple nia E-klubo havas la saman oficialan nomon. Ĝi havas la eblecon oficiale propagandi Esperanton — nian laborlingvon, kaj korespondi kun la tuta mondo. Tial propagandcele por ni estas grave ricevi leterojn el ĉiuj landoj, kie estas ĉe nur unu esperantisto. Do, por la progreso de Esperanto en nia lando, skribu al niaj E-kluboj amikajn leterojn! Viaj leteroj helpas al ni.

Vasilij Grigorenko.

Prezidanto de la Poltava Regiona E-klubo

Ni recenzas

Naum Sigal—Podolskij

LA BLINDECO NE ESTAS OBSTAKLO

La ukraina verkistino Nadia Nikolajevna Gordienko—Andrianova dediĉis pli ol kvin jarojn por kolekti materialojn pri la vivo de la esperantista poeto Vasilij Eroŝenko. Li naskiĝis en vilaĝo Obuhovka, distrikto Belgorod, kie loĝas multe da elmigrintoj el Ukrainio. La biografio kaj la agado de Eroŝenko estas tre interesaj kaj instruaj.

Jam kvarjara, pro malsano Eroŝenko perdis la vidkapablon, pro kio li ne povis viziti la lernejon en sia vilaĝo. Tial li estis sendita al Moskvo, kie li finis lernejon por blinduloj. Ricevinte altan klercon, Eroŝenko, malgraŭ sia blindeco, dum sia mallonga vivo sukcesis viziti multajn okcidentajn kaj orientajn landojn kaj nordajn regionojn de Sovetunio.

La verkistino en sia libro titolita „Ekbruligis mi fajron en kor“ (vortoj prenitaj el la versaĵo de Eroŝenko „Amo al la homoj“), detale rakontas pri la agado de Eroŝenko en Moskvo, Parizo, Londono, Tokio, Bang-

koko, Ranguno, Kalkuto, Sanĥao, Pekino kaj aliloke, kie li estis (inkluzive Finnlandon kaj Germanion, kie la blinda poeto partoprenis Universalajn kongresojn de Esperanto).

Estas interese rimarkigi, ke laborante en diversaj landoj de la mondo Eroŝenko penadis ankaŭ ellerni la lingvojn de tiuj landoj. Precipe bone li ellernis la japanan lingvon. „Se vi deziras trovi ŝlosilon al la koroj de la lokaj loĝantoj — estimu iliajn kutimojn kaj en unua vico ekposedu ilian lingvon“ — tiel konsilis kaj faris li.

Tro frue Eroŝenko konatiĝis kun la revolucia movado — jam antaŭ ol eniri en lernejon de blinduloj oni rakontis al li pri la vivo de la homoj ekster la lernejo, pri la Bolŝevista Partio, pri Lenin, pri la verkaro de Maksim Gorkij. Poste, estante en 1912 j. en Londono, Eroŝenko vizitadis la „Komunistan Klubon“. Tie li konatiĝis kaj amikiĝis kun Karpoviĉ, kiu faris atencon

kontraŭ la klerigministro de cara Rusujo Bogolepov.

Multe influis por la mondkoncepto de Eroŝenko lia amikeco kun famaj homoj kiel Lu-Sin (el Ĉinio) kaj poste kun la japano Sen-Katajama dum ties estado en Moskvo.

Dum tuta sia vivo Eroŝenko troviĝis je la flanko de la subpremitaj homoj kaj popoloj. Ĉiujn siajn deklarojn en la gazetaro, en la kunvenoj kaj dum la mitingoj li ĉiam dediĉis al la situacio de la mallibervolaj. Multe da poemoj kaj legendoj je tiu temo li verkis japanlingve.

Eroŝenko multjare laboris kiel pedagogo en lernejoj por blinduloj. Li estis invitita kaj laboris ankaŭ en la katedro de rusa lingvo kaj internacia lingvo Esperanto en la Tokia Universitato (Japanio) kaj poste en la Pekina Universitato (Ĉinio).

Venkinde multajn malfacilaĵojn Eroŝenko revenis al Sovetunio en 1923 j. Komence li laboris kiel tradukisto el la japana lingvo kaj samtempe tradukis poezion kaj diversajn broŝurojn el la rusa en E-on. Poste li transiris en la administracion de la blindula kompanio.

La amo al vojaĝoj, la deziro doni ĉion, kion li havas en si, kondukis lin al Ĉukotka, situanta en la plej malproksima nord-orienta punkto de USSR, kaj poste al Suda Turkmenio apud la landlimo kun Afganiŝtano. En ambaŭ lokoj li laboris.

Oni devas substreki, ke la aŭtorino de la libro Andrianova faris grandan laboron, kolektante po grajn materialojn por la biografio de Eroŝenko. Ŝi uzis ankaŭ multajn fragmentojn el lia verkaro, enkondukis liajn informojn pri la vivo de la blinduloj en Rusujo kaj ekster ĝi, rakontis pri la moroj kaj kutimoj de diversaj popoloj. Grandan atenton ŝi dediĉis al la internacia lingvo E-o kaj la laboro de la e-istoj, citis eldirojn de Tolstoj kaj Gorkij pri E-o ktp.

La libro prezentas intereson kaj por junuloj, kaj por plenaĝuloj, ĉar la tuta vivo kaj agado de Eroŝenko ilustras la triumfon de la spirito super la korpo. Li mem diras, ke oni povas vidi la mondon „ne nur per okuloj, sed ankaŭ per la koro; se la koro de la homo estas blinda kaj surda, tiam la okuloj nenion vidos.“

La libron de N. Andrianova oni devas rekomendi al blindaj homoj kaj iliaj parencoj kaj proksimuloj. Tiuj lastaj povas tralegi ĝin al blinduloj, por ke ili konvinku, ke la blindeco ne estas malfeliĉo nevenkebla.

Ni devas esprimi bedaŭron, ke tiu utila kaj interesa libro aperis ĝis nun nur ukrainlingve. Ĝi devas aperi ankaŭ en rusa lingvo kaj en E-o, tiam multe pli da homoj, aparte la e-istoj, havos la eblecon konatiĝi kun la mirinda talenta homo, poeto, poligloto kaj arda e-isto Vasilij Eroŝenko.

Grava artikolo de prof. Peevski

En n-ro 2/1977 de „Scienca Mondo“, organo de la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj, kiu aperas en angla, franca, germana, rusa kaj jam trian jaron ankaŭ en Esperanto, estis publikita grava artikolo de prof. Vasil Peevski, ĉefredaktoro de la E-eldono de la revuo, pri la temo „La scienco kaj la Internacia Lingvo“. La artikolo per la forto de la sciencaj analizo kaj argumentoj pledas por Esperanto. Ĝi havas jenajn subtitolojn: la kreskinta rolo de la scienco; la multlingveco; efektiveco de la informado; internaciaj sciencaj kunvenoj; la partoprenantoj de la internaciaj kunvenoj; la personaj kontaktoj; aliaj postuloj por unu internacia lingvo; la neŭtrala solvo; la „artefarita“ lingvo.

La artikolo elvokis grandan favoran eĥon ĉe la legantoj de la revuo. Pri tio atestas la recenzoj pri ĝi, aperintaj en kelkaj E-revuoj, kaj la multnombraj leteroj, kiujn ĝia aŭtoro ricevis de sciencistoj ne nur e-istoj, sed ankaŭ — kio estas tre grava — de nee-istoj. Ili pruvas la ĝustecon de la konkludoj, faritaj en la artikolo. Sube mi citos kelkajn el la leteroj.

D-ro Detlev Blanke, nuna prezidanto de la Centra Laborrondo de Esperanto en la Kulturligo de GDR kaj konata esperanto-

logo, en sia letero de la 13 de decembro 1977 gratulas varme la aŭtoron pro la „bona artikolo“ kaj sciigas, ke li estis informita pri ĝi de kunlaboranto de la gazetara informagentejo de la Kulturligo. Li konkludas: „Do, via artikolo efikas.“

En sia letero de la 9-a de decembro 1977 d-ro Leszek Kordylewski el Krakovo informas pri la aperigo en „Pola Esperantisto“ de recenzo pri la artikolo, verkita de li, kaj petas permeson traduki la artikolon en la polan lingvon kaj eventuale represi ĝin en sciencpopulara revuo, aŭ profiti ĝin similmaniere pollingve.

La vicprezidanto de la Societo de Esperanto-amikoj en Beogrado k-do Danĉiko en longa letero de la 23-a de marto 1978, esprimante siajn „plej bonajn kaj plej belajn impresojn“ pri la enhavo kaj ekstera aspekto de „Scienca Mondo“, substrekas, ke lin speciale tuŝis la numero 2/1977, en kiu aperis la suprecitata artikolo. Li aprezas la lastan kiel brilan kaj la plej sukcesintan artikolon pri Esperanto, kiun li ĝis nun havis la okazon tralegi en faka kaj sciencpopulara E-literaturo ĝenerale. Plue li informas, ke li tradukis la artikolon en sian nacian lingvon kaj petas permeson publikigi ĝin.



En mallonga germanlingva letero de la 14-a de aprilo 1978 k-do Kurt Bandisch el la centra estraro de la revuo „Gewerkschaft Wissenschaft“ (Sindikata Scienco), Berlino, skribas: „Via artikolo en n-ro 2/1977 trafis ĉe multaj legantoj de „Wissenschaft Welt“ (la germanlingva eldono de „Scienca Mondo“ — noto de la aŭtoro) eĥon kaj intereson.“ Li sciigas, ke ili ricevis tiutempe leteron de prof. d-ro Bernhard, fizikisto en

la Humbolta Universitato.

La ekzemploj de s-anoj Kordylewski kaj Danĉiko estas sekvendaj. Tiurilate la landaj Esperanto-Asocioj povas ludi gravan rolon. La artikolo tute meritas esti inkludita en la novan serion de E-dokumentoj, eldonatan de UEA. Tiamaniere tiu ĉi gravega artikolo atingos pli larĝan disvastigon kaj fariĝos efika ilo en nia laboro por vastigo de la aplikkampoj de Esperanto.

D. Haĝiev

Libera tribuno

ANKORAŬ UNU REEĤO

En „Bulgara Esperantisto“ n-ro 5/1977 min ekinteresis la artikolo „Ĉu por aŭ per Esperanto“ de s-anino Ida Lisiĉnik.

Mi opinias, ke ne sufiĉas nur paroli en E-o, sed necesas paroli per ĝi pri neesperantaj temoj. Rigardu la E-gazetaron. Oni trovas tie artikolojn pri niaj seminarioj kaj kongresoj, pri la vivo de niaj E-kluboj kaj grupoj, pri Zamenhof kaj E-historio, pri gramatikaĵoj kaj pri novaĵoj el la E-mondo. Do nur E-temoj. Simile la nacilingvaj propagandiloj gurdas la faman kanton pri la bezono de komuna internacia helplingvo, pri la solvo de Zamenhof, pri la kvalitoj kaj la estonteco de E-o, sed ĉu el tio la neeistoj povas konkludi, ke nia lingvo taŭgas ankaŭ por io alia ol por babili pri si mem? Kiun ordinaran homon povas varbi por E-o nura rakonto aŭ versaĵeto, aŭ politika artikolo, kiuj de temp'al tempo aperas en niaj presaĵoj? Mankas al ni gazetoj de la speco „Homo kaj Kosmo“, kiuj per la Internacia Lingvo rakontos pri aferoj interesantaj ĉiujn homojn, eĉ tiujn, kiuj nek scias, nek konas nian lingvon. Kaj ankoraŭ pli: mankas nacilingvaj presaĵoj, kiuj informus la neesperantistan publikon, kion interesan alportis nia gazetaro pri scienco kaj sporto, pri naturo kaj arto, kiuj prezentas intereson kaj amuzus la legantaron. Ĉar unue ni devas pruvi, ke E-o povas servi eĉ al tiuj, kiuj ne scias ĝin, kaj nur poste oni ekkredos pri ĝia utileco kaj lernos ĝin.

Mi deziras tuŝi ankaŭ alian gravan aferon. Multaj neeistoj opinias, ke E-o volas anstataŭi la naciajn lingvojn. Unu sinjoro, kiu pensis, ke E-on parolas en la mondo jam 70 milionoj da homoj (mi preferis ne korekti lin), klopodis konvinki min, ke E-o malvenkos en konkurenco kun la angla,

ĉar kio estas 70 milionoj kompare kun 200 milionoj! Li tute forgesis, ke tio, kio servus al 70 milionoj da homoj, ne povus esti senutila. Sed tia kelkfoje estas la imago de la publiko, ke E-o sen monopolo en la internacia komunikado estas por nenio. Esti nur unu el la mondlingvoj, paralele kun la angla, franca aŭ rusa, oni konsiderus fiasko. Sed ĉar nia lingvo ankoraŭ ne atingis eĉ tiun staton, kial kredi al ĝi?

Krom tio nia propagando (parolanta pri Lajbnic, Komenski kaj Dekart, pri tio, kion la homaro povus atingi, se ĝi uzus komunan helplingvon, pri la certigoj, ke E-o iam venkos) ne nur ne konvinkas la publikan opinion pri la jam menciita neceso de monopolo, sed ankaŭ forŝovas la signifon de la Internacia Lingvo en la estontecon! Kaj en estontecon nedifineblan kaj malcertan! Oni poste respondas: „Kiam E-o venkos, ni lernos ĝin, sed antaŭe ne!“ Kaj ĉar tion diras al vi ĉiuj, E-o venkos neniam! Estas prave, ke nia lingvo ne venkos, se ĉiuj nur atendas kaj ne lernas ĝin. Sed por lerni ĝin oni bezonas kredi, ke E-o jam havas signifon nun, en ĉi tiu momento, ke ĝi havos ĝin ĉiam, sendepende ĉu ĝi iam „venkos“ kaj akirós la monopolon aŭ ĉu uzos ĝin nur kelkaj milionoj. Tial estas bone akcenti tiujn avantaĝojn de E-o, kiuj ne dependas de la nombro de ĝiaj uzantoj. Ekzemple la edukiga signifon, precipe por infanoj, kiuj kun ĝi ellernos multajn internaciajn vortojn uzatajn en naciaj lingvoj diversfakaj. Per E-o la infanoj pli facile ekposedas la naciajn lingvojn, kiujn oni ofte devige lernas en la mezaj kaj superaj lernejoj.

Miroslav Malovec,
Brno, ĈSSR

Abono al „BE“ por 1978 ankoraŭ eblas. Ĉiu societo varbu speciale inter la novaj kursanoj! Sumojn sendu kolektive. Aparte sendu nomaron de la novaj abonintoj.

Ni nepre atingu 6100!

Verdaj ŝteloj

Ivan Krilov

LA MUSO KAJ LA RATO

«Amik', ĉu aŭdis vi pri bona fam'? —
la Mus' alkure laŭte diris.

Al ungoj de leon' la kato trafis jam!
Jen fine por ripoz' liberon ni akiris!»

«Ne ĝoju, mia frat', —
al Mus' respondis Rat', —
kaj ne esperu absolute.
Se komenciĝos interbat',
pereos la leono tute:
plej forta besto estas kat'!»

Multfoje vidis mi kaj tion mi konfesas:
timulo timas iun ajn
kaj kredas, ke timata ŝajn'
la tutan mondon jam impresas.

El la rusa: S. Rublev

NOVAJ PROVERBOJ

Troa rapido kondukas al rido.
Pensi ĝuste — juĝi juste.
Ne vekigis intereso per kareso pro neceso.
Sen diplomo — eta homo, kun diplomo —
grava nomo.
Se oni min laŭdas, bonege mi aŭdas.
Oni renkontas laŭ la ĉapo, adiaŭas laŭ la kapo.

R. Grinŝpan

DISTRA ANGULO

GRAFOLOGIO

La granda franca verkisto Onore djo Balzak okupiĝis pri grafologio. Li pretendis povi diveni la karakteron de la homoj laŭ ilia skribmaniero.

Iun tagon, kiam li estis gaste ĉe amika familio, ĉiuj el la ĉeestantoj montris al li kelkajn liniojn, skribitajn per ilia propra mano, kaj Balzak parolis pri la karaktero de ĉiuj. Oni multe amuziĝis. Fine la dommastino alportis kajeron de iu lernanto.

— Diru al mi, kara instruisto, kia estas la karaktero de tiu ĉi infano?

Balzak rigardis la kajeron kaj diris:

— Sinjorino, ĉu vi estas patrino de tiu ĉi infano?

— Ne, sinjoro.

— Tiam mi povas paroli sincere. Tiu ĉi infano estas neglekta, maldiligenta, senpripensa, distriĝema, li ne ŝatas la ordon. Neniam li faros ion bonan, do neniam li sukcesos en la vivo.

Ĉe tiuj vortoj la sinjorino eksplodis en rido.

KATINO ŜATAS TELEVIDON

En urbo Katovico (Pollando) iu familio havas siamorasan katinon, kiu tre ŝatas televidon. Kiam iu el la familianoj funkciigas la televidaparaton, la katino tuj sidigas apude kaj sidas ĝis kiam finiĝas la televidelsendo...

Antaŭ nelonge ĉi tiu katino naskis idojn, tamen ankaŭ tio ne ŝanĝis ŝian kutimon. Ĉiuvespere ĝi alportas per la dentoj siajn idojn, eksidas kun ili antaŭ la ekrano de la televidaparato kaj atente rigardas la programon.

En kiom da lingvoj parolas la homoj

Laŭ faktoj de UNESKO la loĝantoj de nia planedo parolas en pli ol 2500 lingvoj. El ili nur ĉirkaŭ 250 havas sian propran alfabeton. Nur en Afriko oni parolas en ĉirkaŭ 730 diversaj lingvoj kaj dialektoj. La sesmiliono loĝantaro de Kameruno ekzemple parolas en centoj da dialektoj.

La plej disvastigitaj el ĉiuj lingvoj estas la angla, hispana, rusa, hinda, franca, araba, germana, japana kaj portugala.

— Sed, sinjoro Balzak, kial vi ne rekonis vian propran skribmanieron? Tio ĉi estas unu el viaj propraj kajeroj kiel lernanto.

El la franca: J. Daskalova

— Diru, ĉu estas ja danĝere, kiam oni flugas per grandaj reakciaj aviadiloj.

— Jes, kompreneble, mia kuzo konatiĝis kun stevardino kaj poste edziĝis al ŝi.

— Ĉu vi scias, kial la mallonga montrilo de horloĝo estas pli dika ol la longa?

— Jes, ĉar ĝi tre malrapide moviĝas.

ENIGMO

Kie la juneco ne kapablas ĉesi?
Kie pri maljuno povas hom' forgesi?
La legant'eksciu tuj pri la sekret
gejunuloj restas junaj oĝarod uns

R. Grinŝpan

(laŭ temo de J. Sadovski)



deziras korespondi

Bulgario

Kostadin S. Kostadinov — 1606 Sofio, bul. D. Blagoev 15 A (ĉl—ĉt)

Cvetanka Ilieva — Zavod „Balkan“, ot-del kooperirane, 5500 Loveĉ (ĉl—ĉt)

Borjana Rajkova — str. Marko Ivanov 11, 5500 Loveĉ (25-jara fraŭlino, kun ĉl)

Simeonka Vasileva — str. Boris Boev 23, IV et., 5500 Loveĉ (35-jara fraŭlino — kunĉl)

Temenujka Toteva Kristova — bl. 107 A, vĥod B, 5500 Loveĉ (19-jara fraŭlino — en Esp-o kaj angla, kun ĉl)

Ivan Petrov — Dojrenci, Loveŝko (28-jara fraŭlo — kun ĉl)

Stojan Vălev — str. Osâmska 77, 5500 Loveĉ (38-jara fraŭlo — kun ĉl)

Katja Jordanova — selo Umarevci, Loveŝko (22-jara fraŭlino — kun ĉl)

Aneta Laleva — kompleks „Karl Marks“ bl. 3, II et. (24-jara — kun ĉl)

Enĉo Najdenov Mulevski — komplekso „Lenin“, bl. 112, vĥod A, ap. 3 (30-jara fraŭlo — kun ĉl pri ĉt, bk, insignoj, kutimoj)

Marija Nik. Lilova — bul. Konstantin Veliĉkov 85/3 1309 Sofio (24-jara fraŭlino, inĝeniero de ĥemio, kun ĉl en E-o, rusa, franca, angla)

Elena Georgieva Ivanova — bl. 204, vĥod J, et. 8, ap. 21, 5500 Loveĉ (56-jara — kun ĉl)

Detelina Sofijanov — bl. 205, vĥod D, ap. 7, 5500 Loveĉ (22-jara — ĉl)

Valentina Deĉeva — bl. 202, vĥod A, ap. 2, et. I, 5500 Loveĉ — (21-jara — kun ĉl)

Ĉeĥoslovakio

13 gelernantoj dez. korespondi kun ĉl kaj interŝanĝi bk, pm ka. Komuna adreso: Esperanto-krouĵek, l. ZDS 542 01 — Zacléz

L. Matulova — p. o. Box 119, 58601 Jihlava (nur kun kolektantoj de moneroj kaj bankobilettoj)

VORTENIGMO „5 LITERO!“

Horizontale: 1. Unu el la planedoj de la suna sistemo. 4. Aĵo uzata ĉe legado. 9. Loganto de suda Eŭropo. 11. Scienco pri la moralo. 12. La ŝelo de arbotrunko (radiko). 13. Kosto.

Vertikale: 2. Maparo (rad.). 3. Nomo de varmego vento. 5. Arda aspiri (rad.). 6. La rilato inter la trairita spaco kaj la tempo, uzita por la trairo (rad.). 7. Parto de la vorto (radiko). 8. Hejma animalo. 10. Gastrola veturado (radiko.)

G. Berezin, Doneck

GDR

H. Bein, — 409 Halle — Neustadt, Block 147/2 (40-jaraj geedzoj — kun bulgaroj pri turismo, gram. diskoj, bk, pm)

Beate Friedrich — Roter Muhlenweg 19, 943 Schwarzenberg (24-jara elektroteknikistino — pri profesio, E-movado)

Else Haberlein — Heilig Ackerweg 24, 943 Schwarzenberg (55-jara fervojista inspektorino — pri politiko, ĝardenlaboro)

Eberhard Speckin — Badstr. 1-a, 943 Schwarzenberg (27-jara laboristo — bk, junulara movado)

Frank Spiller — Walter Ulbrichstr. 10, 943 Schwarzenberg (14-jara lernanto — bk)

Hildegard Schieck — Heilig Ackerweg 28, 943 Schwarzenberg (51-jara vendistino — pri E-movado)

Andre Burgel — Walter Ulbrichtstr. 4, 943 Schwarzenberg (15-jara lernanto)

20 gelernantoj — kun ĉl, kolektas ankaŭ pm, bk, Komuna adreso: Gert Kölbel, Marchlewskistr. 9, 95 Zwickau

Norbert Karbe — Siegfried-Rödel-str. 16, 8312 Heidenau (23-jara industria komercisto, kolektas bk, ŝakludas)

Francio

Blohin Pierre — 41 Av. Anatole France, 92 700 Colombes (kun bulgaraj filatelitoj)

Grekujo

Petros Vernardos — atr. Zoodochou Pigis 85—87, Ateno T. T. 707 (32-jara instruisto — kun bulgaroj)

Zaharakis Konstanteno — Harilau Tri-kupi 145, T. T. 708, Ateno (juna juristo — kun gebulgaroj)


Irena Georgila, Aftocratoron Anghelon 4, Leoforos Alexandras, Ateno 707 (mezaĝa sinjorino)

Filio Kazanĝidou — Litous 3 Viron — Ateno (juna fraŭlino)

Kostas Polihroniadis — Themidos 3 — Kallitea, Ateno (juna s-ro)

Mozenidu Fenja — Elefterias 93 Moshato Ateno (30-jara fraŭlino)

Kosta Kiriakos — Idras 3 — Kipseli, Ateno (juna kursgvidanto — kun bulgarinoj)



Hungario

Ambrus Zoltanne — Tinodi u. 6. II. 1, 1095 Budapest (55-jara emerita instruistino — kun samaĝa bulgara esperantist(in)o) Gestudentoj el la IV kurso de Pedagogia Instituto dez. korespondi kun bulgaraj gce-istoj. Komuna adreso: H-3301 Eger. pf. 43. OROSZ INTEZET. Jen la nomoj:

fraŭlinoj Papp Agnes, Szendrene Molnar Erzsebet, G. Hideg Edit, Farkas Julianna, Konya Ilona, Balazs Irén, Szepesi Péterné, fraŭloj: Simon Gustav, Marton Tamás

Kubo

Mezlerneja E-rondo, komuna adreso: 4 Esperanto-rondo, Mezlernejo „V. I. Lenin“, Carretera las Gansimas km 3 ½, Habana

Mongolio

Zavhan Ajmag Uliastaj hot. Holbooni oopoo XV leen avah gazar, H. Suhjargal (lernanto en X klaso — kun gebulgaroj)

Venezuelo

Alvaro Calderon — San Fidel a San Rafael 16, Sarria, Caracas (studento-inĝeniero)

Aura Esther Zambrano — 7-a transversal, Av. Los Castanos, Quinta Luz Mara, El Cementerio, Caracas (studentino de biologio)

Bertillia Valdez de Gomez — Residencia Vista Hermosa, Pisol ap. 12, Final calle Caurimare, Colinas de Bello Monte Caracas (studentino de juro)

Antonio Jose Acevedo — Apartado 28. 140—110, Caricuao, Caracas (studento de ekonomio)

Carlos A. Delgado Rueda — Centro Universitario de E-o, Centra Universitato de Venezuela, apartado 76626, Caracas 107 (helplibrotenisto)

Carmen Rodriguez Romero — Avenida Sur 17 № 29, El conde, Caracas (oficistino)

Efrain Labana — Centro Universitario de E-o, Apart. 76 626, Caracas (komercisto)

Eleazar Uribe — Avenida el Paseo 94, Quinta monte Carmelo, Los rosales, Caracas (perforisto I. B. M.)

Marisela Arebalo R. — Ave, Bogota, Edif. Marben, ap. C. Los Caobos. Sarria, Caracas (ĵurnalistino)

Elio Arias — (bloque 22, apartamento 31) au Apartado de Correos 76626, Caracas 107, (oficistino)

Sovetunio

Inna Kivimaa — 1 Maj 1—4, 203 504 Järvakandi, Estonio, USSR (23-jara — kun ĉl pri ĉt)

Peep Padar — M. Gorkij pst. 27, 203 504 Järvakandi, Estonio, USSR (13-jara lernanto — pri ĉt, pm)

Ona Bareikaite — Debreceno 84—55, Klaiĝeda 235 815, Litovio, USSR

Gelernantoj (10—17-jaraj) — kun ĉl pri ĉt, pm, bk, gram. diskoj. Skribu amase al ilia komuna adreso: Esperanto-grupo, Saldutiŝkio vid. m-la, Utenos raj., Litovio, USSR.

V. P. Beŝkarev havas novan adreson: prosp. Gagarina 222, kv. 95, 603137 Gorkij.

Gelernantoj 15—18-jaraj — kun ĉl pri ĉt. Skribu al ilia instruisto: Vincas Grigaitis — str. Žemaites 1—86, 232015 Vilnius.

Heli Kitsing — str. Posti 25—6, 202900 Viljandi, Estonio, USSR (35-jara bibliotekistino — pri literaturo, bk)

40 gestudentoj el la Universitato de Voroneĝ — pri ĉt kun ĉl, pm. Skribu amase al komuna adreso: USSR, 394 694 Voroneĝ — Centro, Universitetskaja pl. 1, WGU komn. 212, FOP, Esperanto.

Dina Dilmuĥametova — Internacionalnaja 75, kv. 79, Ufa — 40, 450 040 (inĝeniero-ekonomiistino — kun ĉl pri ĉt)

Nikolaj Vasilieviĉ Olencev — 350 000 Krasnodar — Centro, abonkesto 18 (agronomo — pri agrikulturo — sur grunto kaj sub vitro, filatelo, proverboj, popoldiroj).

Kafiskin Rinat — m. Severo — Vostok 2, d. 88, kv. 63, 700 124 Taŝkent (studento).

Levickij Naum — ul. Traktorostroitelej 103/93, 310 136 Harkov (52-jara inĝeniero — amatorfilmoj, foto, literaturo, bk)

Studenta E-Klubo „Impulso“ — kun ĉl pri ĉt. Komuna adreso: Kudrjavcev Viktor — pr. Lenina — 80, 454 044 Ĉeljabinsk.

Lidia Luik — Pölva rj., 202 600 Vana-Koiola, Estonio, USSR (19-jara lernantino).

Hille Vana — Pölva rj., 202 600 Vana-Kciola, Estonio, USSR (17-jara lernantino)

Tea Roos — Pölva rj., 202 620 Holvandi, Partsi, Estonio, USSR (16-jara lernantino)

Olja Ahtjamkina — str. Krasnih Komunarov 16—1, 443 059 Kujbiŝev (19-jara — muziko, teatro, sporto)

Larisa Bessarabova — str. Sovetskoj Armii 160—15, 443 090 Kujbiŝev (29-jara — muziko, literaturo ka)

Tanja Jaŝparova — Tuĥaĉevskogo 222-42, 443 013 Kujbiŝev (20-jara — mod. muziko, teatro, literaturo)

Vjetnamio

Kim Hoang — 316/7 A Rue Nguyen Van Troi, Ho Chi Minh ville (kun ĉl — bk, pm, muzikartoj ka).

La 24-an de marto forpasis 56-jara

d-ro Ludoviko Márton

merita aganto de la hungara E-movado kaj de MEM, vicprezidanto de la Internacia Asocio de Juristoj, iniciatinto kaj multjara redaktoro de „Internacia Jura Revuo“.
